

Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto
139
vintro 2024-2025



leĝa depono ĉe BNF
ISSN 2609-5203

federacia retejo

<http://www.esperanto-provence.org>

prezidanto

Rosy Inaudi
06 18 35 18 40
r.inaudi@free.fr

aliĝkoto (kun la gazeto): 10 €

> ĉeko al: Espéranto-Provence
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Marc Gallardo
Les Hespérides II Bât. B2
67 boulevard des Alpes
13012 Marseille
gallardomarc@ymail.com
06 09 89 09 14
> aŭ bankĝiro
(bankinformoj sendotaj laŭpete)

sekretario kaj redaktoro

Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°**

15-a de marto 2025
bonvolu sendi al la supra retadreso
><<>
antaŭdankojn pro viaj kontribuajtoj

Vorto de la prezidanto

Karaj esperantistaj geamikoj, 2024 ĵus finiĝis, kune ni antaŭĝojas pri 2025, nova jaro plena je promeso kaj ŝanco.

Ĉi tiu jaro estu, por ĉiu el ni, fonto de inspiro, frateco kaj malkovroj.

Esperanto, ĉi tiu altvalora ligo, kiu kunigas nin trans limoj kaj kulturoj, proponas al ni grandan ŝancon plifortigi niajn interŝanĝojn kaj konstrui pli unuigitan kaj harmonian mondon.

(daŭrigo ĉe la sekva paĝo)



enhavo

2	> aliĝilo > redaktora peto	12	> vojaĝemaj federacianoj
3	> raportoj pri la jaro 2024	17	> el la recepto- kolekto
7	> kultura semajnfino	19	> ZEO en St-Raphaël > mesaĝkesto
11	> el la provencaj asocioj	20	> agendo

(sekvo de la 1-a paĝo)

En 2025, niaj voĉoj sonu pli laŭte ol iam ajn, niaj dialogoj estu riĉaj kaj zorgemaj, kaj nia pasio por ĉi tiu universala lingvo daŭre kresku.

Ni kune faru Esperanton ne nur komunikilo, sed ankaŭ vektoro de paco kaj unueco. Ĉi tiu jaro estu unu el komunaj projektoj, fruktodonaj renkontiĝoj kaj prospero por ĉiuj niaj iniciatoj, ĉu lokaj ĉu internaciaj.

Mi sendas al vi ĉiuj miajn plej varmajn dezirojn pri sano, ĝojo kaj sukceso en viaj personaj kaj esperantistaj projektoj.

2025 estu jaro, kie reciproka kompreno kaj amikeco estu plu teksitaj en la tutmondan teksaĵon, per nia komuna lingvo.

Feliĉan Novjaron kaj longan vivon al Esperanto! Kun mia tuta amikeco,

Rosy Inaudi

Ne forgesu pagi la aliĝkotizon por la jaro 2025 > 10 €

ĉu al via loka kasisto, ĉu al nia kasisto, Marc Gallardo, ĉu per bankĝiro

N'oubliez pas de payer la cotisation pour 2025 > 10 €

à votre groupe local ou à notre trésorier, Marc Gallardo, ou par virement bancaire

Dankon! Merci !

Attention : ce rappel ne concerne pas les adhérents d'Espéranto-Marseille qui paient la cotisation inter-associative (Espéranto-France + groupe local)

Pascal Vilain

Peto de la redaktoro

Pro kialoj konataj de multaj el vi, mi decidis transloĝiĝi kaj reiri al mia devenurbo, Dunkirko. Tio okazos plej verŝajne en la unua duono de la jaro 2025.

Sekve, mi baldaŭ ne plu estos **federacia sekretario** kaj ne plu redaktos la gazeton.

Pri la sekretaria posteno decidis la komitato inter - espereble - pluraj kandidatoj, kiuj sin anoncos.

Pri tiu de **gazetredaktoro**, mi pretas helpi iun ajn, ne nepre komitatanon, kiu ŝatus repreni ĉi tiun taskon.

Mi uzas la programon "**scribus**" por enpaĝigi la gazeton. Nova redaktoro povus peti de mi konsilojn (estas tute facila programo) aŭ povus uzi iun ajn alian programon, laŭ sia prefero.

Mi esperas, ke bonvolemlulo rapide sciigos al mi sian pretecon plenumi ĉi tiun taskon, kiu postulas nur kvarfojan laboron en la jaro. Antaŭdankojn!

Se neniu volos repreni la postenon, mi ne scias ĉu nia gazeto plu aperos...

Federacia agado

Federacia membro-kunveno / Assemblée générale de la fédération dimanĉon la 16-an de marto 2025 - je la 14-a Les Issambres (Var) - Hotelo Miléade kadre de la Mediteranea Esperanto-Semajno

Bonvolu legi la sekvajn moralan kaj agadan raportojn por la jaro 2024.
La finanĉan raporton, kunvokilon kaj voĉdonan rajtigilon (en okazo de via neĉeesto)
vi ricevos fine de februaro.

Vous recevrez à la fin du mois de février le rapport financier, la convocation et le pouvoir (pour le cas où vous ne seriez pas présent).

1 - Morala raporto

Rosy Inaudi

Dum la jaro 2024, nia asocio spertis grandajn kaj profundajn ŝanĝojn.

- Mediteranea Esperanto-Semajno

Kiel kutime, 2024 komenciĝis per la Mediteranea Esperanto-Semajno, kiu okazis de la 9-a ĝis la 16-a de marto en Les Issambres, en la feria centro Miléade. Ebligi ĉi tiun renkontiĝon ĉiam postulas gravan laboron. Ni povis gastigi 80 homojn.

Tiu ĉi organizado komenciĝas kelkajn monatojn antaŭ la kunveno. Ĝia sekvado ofte daŭras kelkajn semajnojn poste.

- Ĝenerala membro-kunveno de Esperanto-Provence

Dimanĉe la 10-an de marto, ni okazigis nian ĉiujaran ĝeneralan membro-kunvenon.

Ni renovigis la estraron. Nova prezidanto, Alain Rémy, anstataŭis Pierre Oliva, kiu prezidis nian asocion dum longa tempo. Ni dankas Pierre pro la laboro, kiun li plenumis dum ĉiuj tiuj jaroj.

Ni ankaŭ elektis novan kasiston. Unue, Nicole Lafitte estis anstataŭigita de Pierre Oliva por tiu posteno. Poste, ni elektis Marc Gallado kiel kasiston. Ni dankas Nicole kaj Pierre pro iliaj multnombraj laborjaroj.

Ĉar Alain Rémy tre ofte forestas dum longaj periodoj, la estraro decidis elekti Rosy Inaudi kiel vicprezidanton.

Rosy Inaudi prezidantino

Ĉi tiu nova posteno de vicprezidanto bedaŭrinde montriĝis tre utila iom poste, ĉar la 30-an de julio, ni eksciis pri la forpaso de nia nova prezidanto Alain

Rémy. Lia morto okazis en Pollando, dum unu el tiuj longaj biciklaj vojaĝoj, kiujn li aparte ŝatis. La estraro unu-anime nomumis Rosy Inaudi prezidanto. Malgraŭ sortobato, la transigo de postenoj okazis senprobleme.

Omaĝo al Alain Rémy

La 19-an de septembro okazis omaĝo al Alain Rémy en La Ciotat. Multaj personoj partoprenis.

Esperanto-arbo

En 2024 ni plantigis Esperanto-arbon en La Ciotat. Ĉeestis multaj homoj kaj la urbestro.

Instruado

Renée Triolle daŭre instruas Esperanton marde en Marseille kaj ĵaŭde en La Ciotat.

Ĵaŭde vespere, en la domo de asocio en Marseille, Thierry Spanjaard organizas renkontiĝojn dediĉitajn al tradukado de la bildstrio Gaston Lagaffe (krom la 1-an ĵaŭdon de ĉiu monato: tiam okazas Esperanto-kafejo por reklami pri nia lingvo en Marseille).

Forumoj

Ni partoprenis en forumoj de asocioj en Marseille, La Ciotat, Saint-Raphaël, Fréjus kaj Embrun.

Kongresoj

Kelkaj el niaj membroj partoprenis en la Universala Kongreso en Arusha kaj

en la Eŭropa Kongreso en Strasburgo.

Kultura Semajnfino en La Garde

La 30-an de novembro kaj la 1-an de decembro ni denove okazigis staĝon en La Garde, por pli malpli 25 homoj.

La klubo Saint-Raphaël

La klubo de Saint-Raphaël daŭre estas aktiva kaj havas multajn membrojn.

École centrale de Marseille

Ni estis kontaktitaj pasintjare de École centrale en Marseille, kiu petis nin prezenti nian lingvon al gejunuloj el nordaj kvartaloj. Sama peto venis ĉi-jare. Estis tre interese, kaj por la partoprenantoj kaj por ni mem.

Resume,

2024 estis grava pro la ŝanĝoj, kiuj okazis. Nia agado daŭras aktive. Ni ŝuldas ĝin al la subteno de niaj membroj.

Mi bedaŭras, ke malaperas iom post iom lokaj kulturaj centroj kaj, kun ili, vesperaj kursoj, kiuj estas la plej bona maniero "kapti" esperantistojn.

Retaj kursoj eble venigas esperanto-parolantojn, sed estas malfacile kontakti ilin. Maljunuloj iom post iom malaperas. Sekve, ni devos trovi rimedojn por venigi gejunulojn... Sed kiel fari?

Mi kore dankas vin.

2 - Agadraporto

Pascal Vilain

1 - Membraro

Je la 31-a de decembro 2024, Espéranto-Provence havis 92 membrojn (+15)

2 - Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2-1 deklaritaj asocioj

- kiuj plu ekzistas kaj aktivas

13 - Marseille - TTT-ejo **ĉi tie**

83 - Eo-Club Fréjus/Saint-Raphaël

83 - Espéranto-Le Beausset

- kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivas

04 - Esperanta Kulturo en Manosque

05 - Espéranto-Gap

13 - Espéranto-La Roque

13 - Groupe Espéranto Miramas

84 - Kultura Eo-Centro de Avinjono

2-2 antenaj grupoj de Eo-Provence

13 - La Ciotat

83 - Hyères

83 - Lorgues

3 – Administro

estraranoj (3)

prezidanto: Pierre Oliva, poste Alain Rémy ekde la 10-a de aprilo, poste Rosy Inaudi kiel vicprezidanto ekde la 30-a de julio kaj kiel prezidanto ekde la 6-a de novembro

sekretario: Pascal Vilain

kasisto: Nicole Lafitte, poste Marc Gallardo

aliaj komitatanoj (6)

Monique Arnaud, Marica Bosnjakovic, Marc Gallardo, Alain Rémy, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez (Alain Rémy forpasis en julio, Marica Bosnjakovic demisiis).

gazetrespondeculo: P. Vilain

retejrespondeculoj: T. Spanjaard, P. Vilain

reprezentanto de nia federacio ĉe

Espéranto-France: T. Spanjaard

membrokunveno > marto 10 - Les Issambres (83)

komitatkunsidoj > aprilo 10, junio 19, novembro 6 - La Ciotat (13)

4 – Instruado

> kursoj: en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille

> staĝoj

- Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres (83): marto 9-16

- Kultura Semajnfino en La Garde (83): novembro 30 kaj decembro 1

> FEI-ekzamenoj: en Marsejlo (13) la 23-an de junio - 5 kandidatoj

5 – Informado – komunikado

> disdonado de Le Monde de l'espéranto (R. Triolle, R. Inaudi kaj P. Vilain)

> lingvaj kafejoj

- en Marseille (La Passerelle, 26 rue des Trois Mages, 130016 Marseille), la 1-an jaŭdon de ĉiu monato

- en Hyères (Hotelo Ibis-Gare), la lastan merkredon de ĉiu monato
- en Lorgues (Carnets de Voyage – 12 av. Allongue – 83 Lorgues, la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato
- > forumoj de asocioj en septembro Embrun (05), La Ciotat (13), Marseille (13), Fréjus (83,)Saint-Raphaël (83)

6 - klubaj eventoj

- > februaro 21 - La Ciotat - Internacia Tago de la Gepatra Lingvo : partoprenis 15 personoj
- > aprilo 23 - La Ciotat: inaŭguro de Esperanto-arbo
- > junio 30 - Saint-Raphaël: komuna manĝo en la Hotelo Miléade, en Les Issambres
- > septembro 19 - La Ciotat: omaĝo al A. Rémy

7 – movadaj eventoj

- > aprilo 21-26 - Kastelo Greziljono: kantstaĝo «Interkant», sub la gvidado de B. Bigonnet
- > majo 8-12 - Strasburgo (67): Eŭropa Esperanto-Kongreso; partoprenis 10 provencanoj.
- > majo 17-20 - Vic (Hispanio): 40-a Kataluna Kongreso de Esperanto - partoprenis P. Lagrange per prelego pri astronomio.
- > junio 30 / julio 5 - Kastelo Greziljono: 5-a Verda Naturisma Semajno, organizita de La Kulturdomo kaj INOE - partoprenis pluraj membroj de Espéranto-Provence

- > aŭgusto 3-10 - Arusha (Tanzanio): 109-a Universala Kongreso ; partoprenis N. kaj G. Wallez
- > aŭgusto 23 - Plouézec (22): C. Bourgeois kaj J.F. Cousineau renkontiĝis kun membroj de la tiea Eo-klubo.
- > septembro 5-8 - Cheste (Hispanio): 82-a Hispana Kongreso de Esperanto - partoprenis C. Segarra
- > oktobro 13 - Parizo: kunveno de FEI - partoprenis R. Triolle kaj P. Vilain
- > oktobro 21-30 - Kastelo Greziljono: 13-a Aŭtunas - gvidis programerojn R. Triolle kaj B. Bigonnet
- > novembro 28 / decembro 1 - 5-a Virtuala Kongreso de UEA: partoprenis la staĝantoj en La Garde
- > dum la tuta jaro: J. Cousineau korektis la revuon «Espéranto-Info» kaj R. Triolle kontribuis per artikoloj al la enhavo de Literatura Foiro.

8 – kulturaj kaj alispecaj eventoj

- > marto 25 - Hérouville Saint-Clair (14): R. Triolle prelegis pri «Esperanto – La danĝera lingvo».
- > majo 8: publikigo de la verko «La Libro de la Mil kaj Unu Noktoj», tradukita de D. Moirand
- > majo 18 - Dunkerque (59): Ateliers des langues - partoprenis per Eo-budo P. Vilain
- > junio 9 - Strasbourg-Khel - Pont de l'Europe: kunveno de kandidatoj de la listo EDE por la Eŭropaj balotoj, i.a. M. Arnaud.

> junio 14 - Gentioux (23): dekjariĝo de la asocio «La Courtine 1917»: «Histoire(s) et Paix» - partoprenis Y. Le Carper rakonto: «Nubido - la lando de l' songôj».

> septembro 22 - La Ciotat: Salono de verkistoj - partoprenis R. Triolle.

> oktobro 26 - Le Havre: Internacia naturista naĝkonkurso - partoprenis INOE-provencanoj: R. Inaudi, M. Gallardo kaj T. Spanjaard

> decembro 8 - La Ciotat: Salono de lokaj verkistoj - partoprenis R. Triolle

9 – diversajtoj

> danke al Pasporta Servo, T. Spanjaard

en Marsejlo akceptis brazilanon, dan-ojn, ĉehon, rusinon, francojn; la ĉeĥo kaj la rusino gastis ankaŭ ĉe M. Duc Goninaz en Aix-en-Provence kaj ĉe M. kaj V. Bosnjakovic en Les Arcs-sur-Angens... kaj ankaŭ en Saint-Raphaël.

> forpaso de federacianoj: A. Rémy, kiu biciklis tra Eŭropo en junio kaj julio, bedaŭrinde forpasis pro trafikakcidento en Pollando la 30-an de julio.

Georgia Henningsen forpasis la 18-an de decembro.

10 – venontaj okazaĵoj

> marto 15/22 - Les Issambres: Mediteranea Esperanto-Semajno 2025

3 - Financa raporto

Marc Gallardo

Ĝin vi recevos poste kune kun la kunvokilo kaj voĉdona rajtigilo por la Membro-kunveno.

Federacia agado (daŭrigo)



Nia Kultura Semajnfino okazis en "Domaine de Massacan", en La Garde (83), la 30-an de novembro kaj 1-an de decembro. Jen kelkaj ricevitaĵaj raportoj kaj fotoj pri la evento.

Rosy Inaudi, pri la tuta staĝo

Ĉi-jare, denove, nia Kultura Semajnfino okazis en la grandioza bieno "Massacan", proksime de Tulono, kie ni renkontiĝis por paroli kaj plibonigi nian Esperanto-nivelon.

Ni estis proksimume dudek.

Iam, Massacan estis fercentro por infanoj. La komforto estas mezbona,

sed ĝi estas plejparte kompensita de la restadkadro. En la centro mem, vojo tra jarcentaĝaj cedroj, eŭkaliptoj, pinoj kaj cipresoj kondukas onin rekte al malgranda, bone ŝirmita plaĝo.

La bonvenigo estis tre varma, kaj la mediteranea manĝo bongustega.

La partoprenantoj estis dividitaj en tri



grupojn, de komencantoj ĝis spertuloj.

Krom la kursoj mem, ni povis ĝui komedispektaklon, kaj ankaŭ havi informojn pri la UK en Arusha, de federacioj kiuj partoprenis en ĝi.

Ĉu ĉi tiu jarfina staĝo ne estis tro mallonga? Ni scivolas, ĉu ni devas plilongigi ĝin je almenaŭ unu tago?

Respondo venos danke al la enketo, kiun ni sendis al ĉiuj partoprenintoj. Do... rezulto venontjare...

Romain Beylerian, pri la 1a-nivela kurso

La lastan semajnfino de novembro, la asocio «Espéranto-Provence» okazigis sian ĉiujaran staĝon en «La Garde». Tie, esperantistoj renkontiĝis en «Domaine de Massacan». Bela kultura loko, kiu situas meze de jarcentaj arboj, ĉe Mediteraneo.

Tiam mi ne bone parolis Esperanton, tamen mi tre feliĉis renkonti novajn samlingvanojn. Verdire, estis la unua fojo, kiam mi efektive parolis kun aliaj personoj ekster la Esperantaj klasoj en Marsejlo.

Kun aliaj Marsejlandoj, mi alvenis al la staĝejo sabaton matene, antaŭ la naŭa. La unuaj kursoj komenciĝas je la deka, tio lasas al mi tempon por provi paroli kaj alkutimiĝi al novaj parolmanieroj kaj prononcoj.

La kursoj dividiĝas en tri laborgrupojn. Mi partoprenas en la unua grupo kun aliaj komencantoj kaj la instruisto

Patrick Lagrange. En nur kelkaj horoj, ni studas grandan parton de la bazaj Esperanto-reguloj, ekde la prononco ĝis la gramatiko. Posttagmeze ni legas tekstojn kaj provas kombini afiksojn kaj radikojn por konstrui novajn vortojn. Laŭ mi, estas la plej amuza ekzerco.



Dum tiu kurso, ni malkovras la retejon de la Plena Ilustrita Vortaro:

<https://vortaro.net>

Tiu vortaro listigas vortojn el oficialaj fontoj, kiel la Fundamento, aŭ el la aldonoj de la Akademio de Esperanto, kaj ankaŭ el neoficialaj fontoj.

Ĝis nun, mi uzis pli ofte la retejon Reta Vortaro (<https://reta-vortaro.de>). Ĝi kompreneble enhavas la difinojn de la vortoj, plus iliaj tradukoj en multaj lingvoj. Oni eĉ povas serĉi laŭ sia gepatra lingvo. Reta Vortaro ankaŭ afiŝas ekzemplojn kun iliaj originalaj tekstoj... estas tre praktike.

Post la kurso venas la libera tempo. Ni spektas privatan komikan spektakleton, dum kiu ni plezure malkovras la artistajn talentojn de nia kolego **Sylvain**. Ni atendas la sekvan malpacience.



Vespere, ni varme manĝas kune. Estas nova oportuno por pasigi agrablan tempon kun personoj, kiuj kelkajn minutojn pli frue estis nekonataj de mi. Dum tiuj momentoj, nia internacia lingvo ŝajnas al mi mirinda ilo por konektiĝi, unu kun la alia, preter la malsamaj aĝoj, kulturoj kaj naciecoj.

La tago finiĝas kun bela rakonto pri vojaĝo al Afriko, pluraj Esperantaj kantoj, kaj kredeble aliaj aktivecoj, kiujn mi maltrafis ĉar mi reiris pli frue al mia dormoĉambro.

La lasta kurso okazas dimanĉon matene, kaj ni reiras al Marsejlo post la tagmanĝo.



Jean-François C. prezentas la revuon "Espéranto-info"



Gilles W. parolas pri la UK en Tanzanio

Estis tre bonega semajnfino. Mi tre ŝatis la muzikojn de niaj artistoj, la kantojn, kaj la kvietajn momentojn apud la maro. Multan dankon al ĉiuj organizantoj kaj instruistoj. Mi esperas renkonti eĉ pli da esperantistoj venontfoje.

Fine, ŝajnas al mi grave, kiam mi skribas per paca lingvo, havi penson kaj kelkajn vortojn pri la loĝantaroj, kiuj nuntempe estas viktimoj de la abomenaĵo de armitaj konfliktoj. Mi pensas pri, sed ne nur, la infanoj kaj homoj, kiuj loĝas en Birmo, Haitio, Libano, Orienta Kongo, Palestino, Sahelo, Sudano, kaj Ukrainio. Mi pensas ankaŭ pri bravaj aktivistoj, ĵurnalistoj kaj ĉiuj homoj, kiuj agas tage kontraŭ la militoj kaj por la paco.

ndlr: Dankon al tiuj, kiuj sendis al mi fotojn.

Rosy Inaudi, pri la 3a-nivela kurso

Naŭ partoprenantoj sekvis la dialogan kurson de **Jean-Pierre Cavelan**, pri arto ĝenerale.

Jean Pierre estas mem artisto. Li de-segnas kaj pentras. Li eĉ kreis parton de la vivo de Zamenhof kiel bildstrion, kiu daŭre aperas en la revuo *Espéranto-info*.

Dum la kunsidoj ni diskutis pri ĉiuj art-oj: pentrarto, skulpturo, arkitekturo, fotografio, kino, muziko, skribado, dancado... En la grupo mem estis kelkaj artistoj: Bernard Bigonnet, ĥorusestro, kiu kantigis nin en la sabata vespero; Pascal Vilain, kiu plurfoje ekspoziciis siajn fotografaĵojn; Mireille Viallon, kiu

retmesaĝo sendita de Jean-Pierre Cavelan post la staĝo

Mi reordigas mian esperanto-biblio-tekono. La reordigado ne finiĝis sed estas jam sufiĉe progresinta.

Por vidi la ĝisnunan liston sufiĉas alklaki la ligilon:

<https://yanpetro-kavlan.fr/qui-suis-je/biblioteko-esperanto-kavlan>

Kiam la reordigado estos tute finita, mi aldonos liston de multaj duoblaĵoj.

Ili estos disponeblaj senpage aŭ al profito de la provenca federacio.



kreas plastikajn artaĵojn; Rosy Inaudi, kiu pentras; kaj Jean François Cousineau, kiu partoprenas en la dialogoj por la bildstrio pri Zamenhof.

La temo "arto" estas ege vasta, estus multe pli por diri. Bedaŭrinde, nia disponebla tempo estis limigita.

pri la 2-a nivela kurso (teksto ne ricevita)



El la provencaj asocioj



13 - Espéranto - La Ciotat

Renée Triolle

Salono de verkistoj

Dimanĉon la 8-an de decembro okazis en la korto de la plej malnova funkcia kinejo en la mondo, « l'Eden » en La Ciotat, salono de lokaj verkistoj. Mi estas regule invitita kaj partoprenis malgraŭ forta vento kaj malmultaj vizitantoj. Tamen mi ne vere perdis mian tempon: mi kolektis tri adresojn de brazilano, rumanino kaj ĉinino por nia venonta agado (Tago de patrino lingvo, la 19-an de februaro je la 18-a) kaj renkontis la urbestron al kiu mi anoncis, ke la Esperanto-olivarbo produktis ses olivojn, neniujn uzablajn ĉar pikitajn de muŝo.

Qui sait tailler un olivier ?

À La Ciotat, la mairie nous a aidés à planter l'arbre de l'Espéranto, un olivier qu'il faudrait tailler. Qui pourrait le faire ?

Prendre contact avec Renée Triolle pour hébergement éventuel et visite de la ville.
triolle.renee@wanadoo.fr



13 - Espéranto - Marseille

Rosy Inaudi kaj Marc Gallardo

Kadre de agado por egaleco de ŝancoj, ni okazigis interparoladon ĉe «École Centrale» en Marsejlo, fama lernejo kiu trejnigas inĝenierojn. En tiu ĉi agado partoprenis ankaŭ «SOS Méditerranée», «Amnesty International», «Centre d'astronomie Marseille» kaj asocio subtenanta la surdulojn.

Ni prezentis Esperanton al 7 grupoj de ĉirkaŭ 15 mezlernejoj subtenitaj de studentoj de la lernejo. Ĉiuj venis el la nordaj distriktoj de Marsejlo, precipe malriĉaj distriktoj. Pli ol cent adoleskantoj partoprenis en nia prezentado.



Laŭplane, ni devis disponi pri kvaron-horo por fari ĉi tiun prezenton, sed pro la neantaŭvidita granda nombro de grupoj, ĉiu interveno estis reduktita al 10 min. Tio estis vere tre mallonga kaj ne lasis multe da tempo por dialogo.

Plej multaj el ili ne konis la lingvon. Aparte plaĉis al ni la demando: “Kial ni ne lernas Esperanton en la lernejo?», kiu revenis plurfoje.

Ĉi tiu tago finiĝis per kvizo en la granda amfiteatro, kie la lernantoj respondis al

30 demandoj rilate la prezentojn, inkluzive de 5 por Esperanto. La kvanto de ĝustaj respondoj estis tre bona entute. Ni povas do konkludi, ke la tago estis tre pozitiva por ĉi tiuj junuloj .



83 - Espéranto Fréjus/Saint-Raphaël

Zamenhof-festo la 8-an de decembro



Vojaĝemaj federacioj

Gilles Wallez

109-a Universala Kongreso en Arusha (Tanzanio – Afriko), de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024

Forlasinte la 108-an UK-on en Torino, ni sciis ke la 109-a okazos en Tanzanio.

Granda revo por Nicole kaj mi, sed ĉu plenumbla? Kiel eblus reiri al Afriko post tiom da tempo... kaj plie al orientafrika lando, certe tre malsimila al la okcidentafrikaj landoj, kie ni jam vivis? Pasis kelkaj monatoj kaj aperis 1-a bulteno pri tiu UK.

Ne, vere ne, ni ne povis ne ĉeesti! Ni do ekkuraĝis kaj plenumis ĉiujn necesajn paŝojn: flugbiletojn, vakcinojn, vizojn,

ktp., sed tamen kun iom da angoro. Ni ja perdis la ardon de nia juneco!

Ekde tiam, ĉio okazis kiel en sonĝo!

La vojaĝo komenciĝis: unue, Nico ĝis Parizo, kie ni vidis afiŝon por la Olimpiaj ludoj, sur kiu estis skribita «Bonvenon» (jes ja, en Esperanto!). Tio estis por ni kvazaŭ destinsigno...

Poste, ni vojaĝis al Addis-Abeba, kie la flughaveno estas grandega kaj moderna. Nova aviadilo al Kilimanĝaro, flughaveno je 50 km de Aruŝo. Sekvis vizokontrolo,

bagagkolekto, taksiatendado. Fine proponis sin taksisto, eble ne tiu, kiun ni petis, sed tiel okazas en Afriko! La vojaĝo estis iom aventurplena, eĉ pli kaj pli ekde kiam ni alproksimiĝis al Aruŝo. Feliĉe, ne mi ŝoforis, des pli ke en Tanzanio oni veturas maldekstre! Kiel antaŭ pli ol 30 jaroj, mi retrovis la saman ĝojan malordon!

Por pliaj informoj pri la UK, mi invitas vin legi, se vi abonas tiun revuon, la tre kompletan raporton, kiu aperis en la numero 165-a de "Espéranto-info" (de la paĝo 12-a ĝis la paĝo 21-a).

Renée Triolle

Aŭtunas en Greziljono

Plian fojon, la kastelo de la esperantistoj apud Baugé akceptis duoblan aŭtunan staĝon, de la 21-a ĝis la 30-a de oktobro. Paralelis lingvo-kursoj kaj kantado far la koruso Interkant, kiun majstre gvidis nia samregionano, Bernard Bigonnet. Luj bedaŭris, ke ili ne povas kanti se ili deziras perfektigi sian lingvo-nivelon.

Mi havis la plezuron gvidi konversacian kurson surbaze de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj: "tio estas seminario", diris unu el la partoprenantoj. Interese estis, ke apud franco (kiu estis laborinta en Sud-Ameriko kaj Egipto kaj aldonis siajn tieajn spertojn) regule intervenis dano, kaj fojfoje germano kaj ukrainino.



Tion mi ŝatas: interŝanĝon inter la homoj, surbaze de teksto aŭ karikaturoj. Plaĉas ankaŭ la fakto, ke ĉiu profitigas la aliajn: tiel aldoniĝis kurso de origamio far ukrainino (eĉ dufoje per televido), kurso pri unuaj savgestoj dank' al germano, kiu portis grandegan sakon kun la necesa materialo, prelegoj i.a. pri plantoj, pri vojaĝo tra Hungario, omaĝo al nia amiko Alain Rémy.

Ne mankas vizito al la lokaj vidindaĵoj: apoteko de la XVII-a jarcento kun centoj da potoj kaj ujoj (en kelkaj restas kremo aŭ sekaj folioj); kastelo de la reĝo René, kiu portis el Provenco plantojn por alkitimigi ilin al Anĵu; provo ludi la lokan globludon (boule de fort), el ligno aŭ plastaĵo nun.

Kiu pretis mediti povi tion lerni kun Xavier ĉiuvespere. Post promeno tra la arbaro, ni povis gustumi la lokajn fungojn (ŝafinpiedo kaj kapo de mortintoj), kiujn vidis Hervé.

Jam tradicia estas la halovena vespero, kiu amuzas ne nur la infanojn, kiuj dekoraciis la salonojn per paperaranaĵoj ks. Dankojn al la kuiristino Kristele, kiu ne nur preparis dum la tuta semajno manĝon por vegetaranoj, veganoj kaj "normaluloj", sed ankaŭ inventis, okaze de haloveno, laŭtemajn pladojn, t.e. okulojn, fingrojn de sorĉistinoj, ne parolante pri supo el kukurbo kaj deserto.



Bernard Bigonnet kun Interkant

Sola bedaŭro: neniu kandidatis por la ekzameno de FEL... Tio permesis al mi, kiu restis kroman tagon, konstati la multajn farenaĵojn post la staĝo, kiujn Bert mastrumas kaj prizorgas.

Ne hezitu aliĝi al postaj sesioj, vi certe ĝuos.

Grésillon tel qu'en lui même

Quand, dans les années 50, les enseignants d'espéranto ont acquis le château de Grésillon à Baugé, près d'Angers, pour y organiser des stages de pratique de la langue, ils ne pensaient pas que le château vivrait toute l'année. Cette superbe résidence dans un parc de 18 hectares propose aux amateurs de nature des balades dans le parc, des trajets à vélo sur des itinéraires dédiés, des visites dans les villages ou châteaux de la Loire. Il est désormais possible de le louer (il y a une soixantaine de lits et un terrain de camping) pour des fêtes de famille ou séminaires divers.

Les espérantistes y maintiennent l'esprit des pionniers : on met la main à la pâte pour dresser et débarrasser les

tables, préparer le petit-déjeuner (merci à Victor qui s'est levé plus tôt pour préparer le café !), passer un coup de balai (même si une femme de ménage entretient le château après les stages). Dans le salon, les groupes s'organisent pour jouer du piano, jouer à différents jeux, sans parler de la belle bibliothèque pour ceux qui désirent faire des recherches, ou du service de librairie qui propose un grand choix de livres neufs ou d'occasion à des prix dérisoires (1 à 5 €). Les sportifs peuvent jouer au ping-pong, au football, à la pétanque, et cet automne s'entraîner au tir à l'arc.

N'hésitez pas à venir en famille, même si tout le monde ne parle pas espéranto, c'est l'occasion d'un bain linguistique



dans une atmosphère bon enfant.

Et si vous voulez contribuer au maintien en état de notre château, vous pouvez faire un don, en ce moment pour restaurer les vitraux de la petite chapelle.

www.gresillon.org

kastelo@gresillon.org 02 41 89 10 34

Thierry Spanjaard

Provencanoj sukcese reprezentas Esperanton dum internacia naturista naĝkonkurso

INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista) estas internacia faka asocio de UEA, kun membroj en pli ol 20 landoj. Tamen la Provenca regiono estas forte reprezentita inter la membroj. INOE partoprenis en internacia naturista naĝkonkurso, kiu okazis de la 25-a ĝis la 27-a de oktobro 2024. Por pli efike varbi, ni estis rimarkitaj, kiel gajnantoj de multaj medaloj. Bedaŭrinde la fino de la tago alportis ege malĝojan novaĵon.

La 52-a internacia naturista naĝkonkurso estis organizita en Havro (Le Havre - Francio) en novembro. La naĝkonkurso altiris grandan nombron da partoprenantoj. La ĉefaj membroj de INF-FNI estas la naciaj naturistaj federacioj. Tiukaze, estis teamoj de Aŭstrio, Belgio, Britio, Ĉeĥio, Francio, Hispanio, Irlando, Italio, Kanado, Luksemburgio, Serbio kaj Svislando. Krome, danke al la fakto, ke INOE

membroj estas en INF-FNI, la Esperanta naturista asocio havis teamon, agnoskitan samnivele kiel tiuj de grandaj nacioj.

Ni estis kvin, inkluzivante 60% da Provencanoj, por reprezenti nian asocion.



La konkurso estas organizita laŭ kvinjaraĝaj kategorioj. Estante kvin naĝantoj, ni obtenis kvin medalojn: du arĝentajn medalojn por Rosy en dorsonaĝo kaj brustonaĝo, du bronzajn medalojn por Yannick en dorsonaĝo kaj libera stilo, kaj arĝentan medalon por mi en brustonaĝo. Marc kaj Didier bele naĝis, ne ricevis medalojn, sed dividis nian teaman gloron. Ni estis varme

subtenataj de Bernardo, esperantisto kaj naturisto, kiu loĝas en Havro kaj kiu dum jaroj membriĝis ambaŭ en CSPO kaj en la loka Esperanto-klubo.

La plej grava trajto de tiuj naĝkonkursoj estas la bonega etoso inter ĉiuj partoprenantoj dum la evento. La plejparto de la partoprenantoj venas ĉefe pro tiu etoso.

Bedaŭrinde, ege malĝoja evento okazis je la fino de la tago: la forpaso de Béatrice Lecœur, la edzino de Jean-Marie Lecœur, la ĉeforganizanto de la tuta evento. Ŝi svenis dum la mateno, estis prizorgita de la sukradistoj, kiuj konsideris, ke ŝi sufiĉe bone fartas je la fino de la mateno. Kaj, je la fino de la posttagmezo, la informo pri ŝia forpaso alvenis.

Renée Triolle

Conférence des ONG en partenariat avec l'UNESCO

Après avoir pendant plusieurs années dirigé la délégation de UEA, je représentais ILEI (Ligue Internationale des Enseignants Espérantophones). Sur les 450 Organisations Non-gouvernementales, plus de 250 avaient envoyé des délégués. Du 16 au 19 décembre 2024, sur le thème "Renforcer les capacités d'action", les ONG ont écouté les panélistes, "haut-gradés" de l'UNESCO, développer ce que fait l'Organisation sans pouvoir vraiment intervenir pour dire ce qu'elles font.

Mi bone konis ambaŭ Béatrice kaj Jean-Marie Lecœur, kaj povas atesti pri ilia afableco kaj ĝentileco. Ambaŭ Béatrice kaj Jean-Marie multe laboris por organizi la naĝkonkurson, kiu devis esti ĝoja evento por ĉiuj. Pro la terura novaĵo de la forpaso de Béatrice, la evento estis haltigita je la fino de la posttagmezo.

Laŭ onidiroj, la venonta naĝkonkurso okazos en Barcelono, Hispanio, en oktobro 2025.

Se vi naĝas kaj estas naturisto aŭ pretas sperti naturismon, ne hezitu aliĝi al INOE por partopreni en tiu ege agrabla evento!

Vi jam povas aldoni ĝin en vian kalendaron kaj plani partopreni en la INOE-teamo.

Reste la priorité Afrique : ne pas oublier que de nombreux talents et actifs existent sur place, il vaudrait mieux les intégrer dans les actions. Un atelier rappelait l'Éducation à la paix. J'ai pu intervenir pour dire que l'éducation à la paix était dans l'ADN de l'espéranto, né d'un jeune humaniste face au communautarisme. Depuis, l'espéranto s'est révélé un excellent tremplin pour l'étude d'autres langues (voir le rapport Grin dans "La Documentation Française") et un outil d'interculture.



L'éducation doit être inclusive (N'oubliez pas les filles, ni les handicapés!) Les nouvelles technologies favorisent le harcèlement et empêchent les jeunes de réfléchir par soi-même et se faire sa propre idée. La nouveauté : l'éducation doit être "verte", c'est-à-dire, faire une large place à l'écologie et mieux intégrer les objectifs de développement durable (programme jusqu'en 2030). Autre nouvelle idée : l'éducation est du ressort des parents, pas seulement de l'école.



Rosy Inaudi

El la recepto-kolekto de la legantaro

Por prepari bongustan bujabeson

Ingrediencoj

por 1 persono : rokfiŝo, granda terpomo, cepo, tomatoj, fiŝsupo, omarsupo, fluto de malfreŝa pano, ajla oleo, hariso, ovoflavo, grujero kaj ĉiuj aromaĵoj listigitaj sube. (Kutime oni antaŭpreparas fiŝsupon, sed mi estas iom pigra, kiel oni diras ĉi tie... mi anstataŭigas ĝin per enladigitaj fiŝ- kaj omarsupoj.

Preparado

> Antaŭ ol komenci, senŝeligi la terpomojn (por 1 persono : 1 grandan aŭ 2 malgrandajn) kaj faru el ili dikajn tranĉaĵojn.

> Preparu la fiŝojn senintestigante kaj senskvamigante ilin. Vi povas peti de la fiŝvendisto, ke li tion faru.

L'UNESCO est la seule instance des Nations Unies à faire une place à la société civile : "Vous êtes les acteurs de terrain", même s'il est difficile de s'y faire entendre. Les Commissions Nationales doivent favoriser les échanges.

Dans le public, des représentants des ONG qui "travaillent" avec l'UNESCO depuis des décennies et en connaissent bien les arcanes, connaissent bien l'espéranto... et des nouveaux, plutôt déboussolés, auprès desquels les espérantistes (représentant UEA, ILEI et TEJO) ont fait du lobbying. Les ONG ont élu les membres du Comité de Liaison : la nouvelle présidente est moldave.

L'interprétation simultanée (qui pèse lourd dans les dépenses des forums) était en anglais (langue de la grande majorité des panélistes) et en français (langue de la majorité des ONG).

Quelques contacts ont été intéressants.

> Preparu la saŭcon («rouille»)

Por fari tion, dispremu kapon de ajlo (forigante la ĝermon) kun malgranda malvarma boligita terpomo. Aldonu ovoflavon, salon. Ĉio devas esti je la sama temperaturo. miksi kun neŭtral-gusta oleo... Mi uzas kolzo-oleon.

Je la fino aldonu tre malgrandan kuleron da hariso.

Ĝi devus havi la aspekton de malmola, iomete rozkolora majonezo.

Preparu almenaŭ 1/2 litro da oleo... pli se necese kaj se ĝi estas tro forta.

Grave: Elektu tre freŝajn fiŝojn. La esencaj fiŝoj estas rokfiŝoj: skorpiofiŝo, mugilo, triglo, trakino, bovofiŝo (?), mureno, merlango, fiŝo de Sankta Petro, saŭpo (?), la fiŝvendistoj povos proponi al vi aliajn.

Prenu fiŝojn, kiuj faras proksimume unu porcion per persono krom la mureno, kiuj devas esti tranĉitaj

> Por komenci, brunigu 1 grandan cepon en olivoleo. Kiam ĝi bruniĝas, aldonu freŝajn maturajn tomatojn (prefere, se ne enladigitajn tomatojn). 1/2 kg Kiam bruna, aldonu la supon kaj la omarbiskon kun duobla kvanto da akvo por la supo kaj unufoje por la bisko.

Aldonu la aromaĵojn: 3 aŭ 4 dozojn da safrano, petroselo, sekigita fenkolo, laŭro, oranĝoŝelo, salo, pipro, 3 aŭ 4 malgrandaj birdaj paprikoj, ŝpruceto da pastiso.

Kiam ĝi bolas, aldonu la terpomojn... boligu 15 ĝis 20 minutojn.

Elprenu ilin kiam ili estas kuiritaj kaj konservu ilin en la varma forno, por ke ili ne malvarmiĝu.

Aldonu la fiŝojn kaj kuiru ilin dum ĉirkaŭ 10 minutoj ĝis 1/4 horo; la karno estu kuirita sed ne tro.

Elprenu ilin kaj metu ilin en la fornون por ke ili ne malvarmiĝu.

> Servu la supon sur tranĉaĵoj de malfreŝa pano (memoru aĉeti la bastonforman panon 2 ĝis 3 tagojn antaŭe) skrapitaj per freŝa ajlo, sur kiu ni sternis iom da rosta saŭco kaj gruyere.

Tiam manĝu la fiŝojn kaj la terpomojn kun la rusta saŭco, kaj antaŭ ĉio pensu tion, kion diras kanzono de Fernandel:

*"Por fari bonan bujabeson,
ellitigu frumatene,
preparu pastison kaj senĉese
parolu per la manoj..."*

Bonan apetiton!



ZEO-j en Regiono «SUD / PACA» > 16 – Saint-Raphaël (83)

Neniu leganto rimarkigis al mi (Pascal V.), ke inter la ZEO en **Saint-Laurent-du-Var** (vidu en la gazeto 137-a) kaj tiu en **Solliès-Pont** (en la n° 138-a), mi forgesis skribi pri ZEO en **Saint-Raphaël**, se respekti la alfabetan ordon. Jen pri ĝi...



La «**Strato Zamenhof**», nomita antaŭe «Rue de la grande batterie», ekhavis sian novan nomon en 1934, laŭ kelkaj trovitaj fontoj. Tio koincidas kun la ĉesto de Lidia Zamenhof en nia regiono en januaro 1934. Ŝi tiam donis kursojn en Marseille, Vallauris, Saint-Raphaël, Cannes...

Ankaŭ ĉijare, la 8-an de decembro, kuniĝis sub la stratplato grupeto da esperantistoj (vidu foton je la paĝo 12-a).



El la mesaĝkesto de la legantaro

La numero 138-a de nia gazeto estigis kelkajn komentojn de legantoj...

Ginier Matthieu

Un grand merci à vous pour cet article (ndlr : "ZEO-j - 15 - Solliès-Pont") qui m'a fait découvrir une partie de la vie de mes arrières-grands-parents et l'histoire de l'impasse Estour.

Maier Utho

Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen

(ndlr : pri la forpaso de Alain Rémy)

Mi tre dankas vian alsendon kaj deziras esprimi la kunfunebroon ankaŭ nome de nia biblioteko. Vian asocion trafis grava perdo. Kondolence.

Noireau Françoise

Dankon pro tiu escepta bulteno.

Triolle Renée

Tre enhavriĉa, kun vera esplorklaboro viaflanka! Mi gratulas kaj dankas.

Pri «Amicale des Parents d'élèves du canton de Solliès-Pont», mi kaj Claude Nourmont bone rilatis kun la "motoro" (mi forgesis lian nomon).

Li instruis Esperanton al lernejoj, kaj implikis la gepatrojn (kaj geinstruistojn) por kromaj aranĝoj. Sufiĉe sukcese en Solliès, La Farlède.

Spanjaard Thierry

Pri la rubriko «Vojaĝemaj Provencanoj» kaj la subrubriko «Verda Naturisma Semajno en Greziljono»: el nia regiono partoprenis ankaŭ Anne-Marie Ferrandez kaj Christophe Collay, el Marsejlo, kaj Patrick Chevalier, el La Ciotat.



À noter sur votre agenda

dans notre fédération

1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille (13)

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6ème

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

dernier jeudi de chaque mois - 17 h - Lorgues (83)

"Carnets de voyage" - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

mars 15-22 - Les Issambres (83)

MES - Semaine méditerranéenne d'espéranto

mars 16 - 14 h - même lieu : Assemblée Générale de la Fédération Eo-Provence

en France

pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

février 22 / mars 2 - La Bastide-sur-l'Hers (09) : 32e Kanto-Semajno de Tut-Pirenea

Esperanto-Koruso. Semaine de chant choral

<https://eventaservo.org/>

mai 23-27 - Vigy (57) : 77e Congrès de Sat-Amikaro

<https://sat-amikaro.org>

juin 7-9 - Nantes (44) : Congrès d'Espéranto-France

<https://esperanto-france.org/congres-2025>

ailleurs en Europe et dans le monde

juillet 19-26 - Belgrade (Serbie) : 58e Congrès international de l'éducation - Eo ILEI

<https://2025.kongreso.org>

juillet 26 / août 2 - Brno (Tchéquie) : 110e Congrès mondial d'espéranto

<https://uk.esperanto.net/2025/>

août 9-16 - Cisarua (Indonésie) : 81e Congrès international des jeunes espéranto-phones (IJK)

<https://ijk2025.tejo.org/novajoj/>

août 9-16 - Baugé - Château de Grésillon : 98e Congrès de SAT

<https://eventaservo.org/e/ad39fc>